



2017-4

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

Rapidu! Rigardu kaj voĉdonu!

Nun videblas la filmetoj por la dua konkurso "Teo kaj Amo" ĉe <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm>, kaj komenciĝis voĉdonado por la dek plej ŝatataj filmetoj, bonvolu viziti la paĝojn kaj doni viajn voĉojn ĝis la **10a de aprilo**.

Danke al apogado de Esperantujo, la kolektado de konkursaĵoj por la konkurso ricevis tre bonan rezulton: 77 filmetojn el 27 landoj kaj 4 kontinentoj – Argentino, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Francio, Germanio, Italio, Indonezio, Kazaĥio, Kolombio, Kongo DR, Kubo, Litovio, Nepalo, Pollando, Rusio, Slovakio, Sud-Koreio, Svedio, Svislando, Turkio, Ukrainio, Usono, Uzbekio, Venezuelo, Vjetnamio. Dume pri la konkurso raportis amaskomunikiloj en Malajzio, Litovio, Ĉeĥio kaj Ĉinio. Pli ol dudek landaj, regionaj, urbaj kaj aliaj E-organizaĵoj multe helpis kaj subtenis la konkurson. Nun ok membroj de la ĵurio laboras por la rezulto de premioj, aprile oni anoncos la rezulton kaj oktobre la premioj senpage partoprenos en la filmfestivalo "Teo kaj Amo" en Ĉinio.

Freŝaj informoj kaj progresoj de la konkurso videblas ĉe https://www.facebook.com/groups/817633741655742/?fref=tshttps://vk.com/teo_kaj_amo kaj https://twitter.com/Teo_kaj_Amo.

Se vi havas dubon aŭ problemon bv. sendi mesaĝon al perfectgoja@163.com aŭ filmkonkurso2015@163.com. Ne forgesu la limdaton! Fulmu pri filmoj!

UEA frue omaĝis al la familio Zamenhof

Ni raportis en EKO 2017-2 pri la programo por la solenaĵo en Varsovio por la Zamenhof-Jaro en la 28a de aprilo. La asocia vic-prezidanto, nepovonta partopreni en la aprila festado, pasigis jam en la 7a de februaro en Varsovio kvin horojn, kiu povis inkluzivi viziton al la juda tombejo kun la tombo de Zamenhof.



Tio malkovris la multnombrecon da parencoj, kiuj troviĝas en tiu sama tombejo. Tuj apude estas la tombo de la edzino Klara, kun memorŝildo pri la filinoj Lidia kaj Zofia. En distanco de malpli ol 200 metroj troviĝas la tomboŝtonoj de la fratoj Feliks kaj Leon, kun ankaŭ tombo de Halina, la edzino de unu el ili, verŝajne Feliks. Nur iom pli for atingeblas la tombo de la patro, Marko. Pli fore kuŝas la fratino de Zamenhof, Aŭgusta, la patrino, Rozalia, kaj ankaŭ la patro de Klara, Aleksandro Silbernik. La aprila solenaĵo, kiun planas partopreni la prezidanto de UEA, inkluzivos pilgriman rondiron al ĉiuj el tiuj tomboj, kaj en preparo estas libro de Roman Dobryzinski pri la familia sorto spurebla en tiu tombejo. Sur la dua foto, s-ino Alina Mozer, la prezidanto de la varsovia filio de PEA.



La unua Internacia Junulara Kongreso en Afriko!

Bonvenon en la retpaĝo de la 73-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017 en Aneho, Togolando:

<http://ijk2017.tejo.org>

La retpaĝo estas dulingva – en Esperanto kaj la franca. Ĝi estas daŭre riĉigata, sed jam nun vi povas trovi ĉi tie informojn pri la kongresa temo, ekscii pri kotizoj, konatiĝi kun partoprenkondiĉoj kaj respondoj al oftaj demandoj, kaj plej grave – aliĝi al la kongreso! Ni ankaŭ invitas vin subteni partoprenon de junaj afrikaj aktivuloj en la unua IJK okazonta en Afriko. Partoprenu kaj kontribuu por ke ni kune realigu ĉi tiun mirindan projekton!

Adjevi Adje, kunordiganto de la Afrika Komisiono.

Vortoj: 600

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/).

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.